

Kometo Hale-Bopp

La Kometo Hale-Bopp estis unue observita la 23-an de julio 1995 de du sendependaj observantoj, Alan Hale kaj Thomas Bopp. Oni ĝin nomis *La Granda Kometo de 1997*.

Ekobservita ĉe 7,1 AU for de la Suno, antaŭobservadaj bildoj aperis montrantaj ĝin ĉe 13 AU for de la Suno. Ĉi tio rapide notiĝis kiel rimarkinda. La kometo estis tre aktiva ĉe ĉi tiuj distancoj, kio estas nenormala.

Multaj kometoj havas grandajn ekaktivigadojn ĉe longaj distancoj kaj poste malaktiviĝas. Hale-Bopp ne faris tion. Ĝi estis nudokule videbla ĉe 2 AU for de la Suno kaj daŭris briliĝi.

Se ĝi pasus same proksime al la Tero kiel la Kometo Hyakutake en 1996, la vosto de la kometo vastiĝus trans la tuta ĉielo kaj ĝi estus pli brila ol la plena luno. Tamen, ĝi alproksimiĝus al la Tero ĉe distancoj kiuj nevidebligus multajn aliajn pli etajn kometojn kaj ĝi tamen vastiĝus trans duono de la ĉielo kun ĝiaj du vostoj, kvankam la pli longaj partoj de la vosto estus tro malbrila por esti videbla. Ĝia nukleo estus 50 km diametre, ĉirkaŭ trioble la diametro de Kometo Halley.

La unua nudokula observo okazis la 20-an de majo 1996 kaj decembra 1997 nudokula observo signifas ke la kometo daŭre videblas sen helpo dum 596 tagoj, aŭ proksimume 18,5 monatoj. La antaŭan rekordon havis la Granda Kometo de 1811, kun ĉirkaŭ 9 monatoj.

La kometo verŝajne laste pasis sian perihelion antaŭ 4200 jaroj, sekvante la perihelion pason de 1997, ĝi revenos al la interna sunsistemo post 2380 jaroj kiel, sendube, denova spektakla kometo.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Kometo_Hale-Bopp